

ESPERANTO-FAKO DE ZK ROH "TŘINECKÉ ŽELEZÁRNY"

EN LA 44-a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

Dum forta pluvo, lacaj, sed feliĉaj, ni atingis la ĉefurbon de Esperantujo, Varsovion. Ĝi vestigis por tiu okazo feste. La stacidomo, hoteloj kaj kongresejo estis ornamitaj per Esperanto-flagoj kaj salut-surskriboj. En la urbo estis dissemataj miloj da afiŝoj kun pola-esperantaj informoj pri nia kongreso. Nia 32-membra grupo ĝuis viglan internacian svarmadon en Studenta domo, nia kongresa hejmo. Intereso de ĉiuj direktiĝis al Palaco de kulturo, nia kongresejo, dominanta al la tuta urbo. En grandega kongresa salono eksonis unuaj inaŭguraj vortoj de s-ro Rajska kaj D-ro Prof. Giorgio Canuto. Ĉeestis ankaŭ oficialaj delegitoj de 12 registaroj. Inter la salut-paroladoj de 46 nacioj brilis ankaŭ la nia, Ĉeĥoslovaka. Neniu el parolintoj forgesis rememori kruelan sorton de Varsovio en la lasta milito. Parolantoj esprimis deziron, ke Esperanto plene helpu, ke io simila jam neniam okazu. Emocio atingis kulminan punkton, kiam 3200 kongresanoj ekkantis, akompanataj de orkestro, nian himnon.

Ĉiuj sekcioj eklaboris. Ni direktis intereson ĉefe al la kunvenoj de Mondpaca Esperanto-Movado, ĉar ĝia estigo havas la radikojn en nia patrujo. K-do J. Staněk el Praha estis elektita kiel prezidanto de la nova MEM-komitato. Danke al la teatra kolektivo "Verda Ĉaro de Julio Baghy" el Praha, komenco de la kongreso apartenis kulture al Ĉeĥoslovakio. La teatraĵon "Pigmaliono" de G. B. Shaw enkondukis per spritaj vortoj mem J. Baghy. La prezento estis dekfoje rompita per entuziasma aplaŭdo.

Kongresa balo estis vere impona danke al luksaj salonegoj kaj multaj partoprenantoj en naciaj kostumoj. Agrable surprizis nin bulgara popola dancgrupo, kiu prezentis al ni popolajn dancojn. Ĝi estis nur ero de riĉa programo, kiun bulgaroj prezentis al ni venontan vesperon, interalie ni vidis la teatraĵon de Ivan Vazov "Ĉasantoj de oficoj".

Merkrede estis malkovrita memortabulo sur la domo, kie vivis D-ro L.L.Zamenhof. Poste okazis silenta omaĝo ĉe lia tombo. Ĉe tiu okazo estis sur la tombon metitaj pli ol 24 florkronoj. Ankaŭ nia oficiala delegacio dediĉis belan bukendon kun rubando.

Ĝojiga fakto estas, ke inter gekongresanoj estis videblaj junaj vizaĝoj kaj mi kuraĝas aserti, ke meza aĝo ne tro superis 30 jarojn. Mi nur bedaŭras, ke dum Junulara vespero pola junularo ne prezentis promesitan teatraĵon de satirkolektivo "Verda Simio".

Vendrede ni vidis "Friponaĵojn de Skapeno" de Molière, prezentis ĝin sprite Internacia arta teatro. Konvenas menciigi, ke pola opero "Halka" de St. Moniuszko, kiu estis prezentita en Esperanto dimance en Krakovo de polaj artistoj, estis la kvara teatraĵo en la kongresa programo.

Dum la kongreso nia grupo disdonis al ĉiu partoprenanto poŝtkarton kun bildo de nacia artisto M. Benka, muziknotoj kaj Esp. traduko de naciaj kantoj. Dum solena fermo nia delegacio disdonis al nove elektitaj komitatanoj malgrandan keramikajon.

Ĉiutage aperadis multaj artikoloj pri la kongreso en taga gazetaro. Ankaŭ aktivis la televido, radio kaj filmo, kies erojn ni jam vidis sur ekrano dum la lasta tago de la kongreso.

Al Internacia Junulara Kunveno en Gdansk oferis tutan paĝon en Esperanto "Dziennik baltycki". Ĝojas nin la fakto, ke pere de Esperanto ni helpis propagandian respublikon, ke ĉiuj aranĝoj pasis en amika kaj paca atmosfero. La tuta kongreso tre helpis al interkompreniĝo inter nacioj kaj grave kontribuis al plifirmigo de tutmonda paco.

Drahomír Kočvara

1859 ZAMENHOFA JARO 1959

Prof. D-ro Al. Dambrauskas:

ZAMENHOF EN LITOVUJO

D-ro Ludoviko Lazaro Zamenhof, la aŭtoro de la lingvo internacia "Esperanto", naskiĝis (1859) en inteligenta familio hebrea en urbeto Baltstogé (pole Bialystok), do inter la limoj de Litovujo historia. Pli malfrue li loĝis en Litovujo etnografia - en la paroĥurbeto Veisiejai. En 3-a mondkongreco esperantista 1907 en Cambridge li publike agnoskis Litovujon sia patrujo, kaj tial al ni litovoj li estas aparte kara. Sian grandan amon al la patrujo Zamenhof esprimis per jenaj vortoj: "Vi staras nun antaŭ miaj okuloj, mia kara Litovujo, mia malfeliĉa patrujo, kiun mi neniam povas forgesi, kvankam mi forlasis vin kiel knabo. Vi, kiun mi ofte vidas en miaj sonĝoj, vi, kiun nenia alia parto de la tero iam povas anstataŭi en mia koro, vi atestu, kiu vin pli multe, pli kore kaj pli sincere amas: ĉu mi, idea esperantisto, kiu revis pri frateco inter ĉiuj viaj loĝantoj, aŭ ĉu tiuj personoj, kiuj deziras, ke vi apartenu nur al ili, kaj ĉiuj aliaj viaj filoj estu rigardataj kiel fremduloj aŭ sklavo!" Ni certe povas ĝoji, ke la eltrovinto de Esperanto, kvankam li ne estas litovo, tamen estas homo proksima al Litovujo.

(fragmento) Esperantigis: Kl. Naudzius

D-ro BEDŘICH MOLNÁR.

La sekvanta poemo estis verkita de D-ro B. Molnár okaze de la Zamenhofa jubileo en la jaro 1927. La aŭtoro estis sincera amiko de Esperanto kaj verkis kelkajn esperantlingvajn poemojn, kiuj ŝajne perdiĝis. D-ro Bedřich Molnár, patro de agemaj esperantistoj Jan kaj Inĝ. Bedřich Molnár en Praha, mortis en la jaro 1928 - en aĝo 82-jaroj.

Via lucis

ČECHY

K Zamenhofovu jubileu 1927.

Cestou k světlu, tak jako náš Amos,
ty jsi, mistře, celým žitím spěl,
a jen za jediným cílem šel:
s b r a t ř e n í přes různorečí nános
Jazyka dar - Boží jistě dání,
- jazyk matky to je svatý chrám -
tak jsi, mistře, dobře cítil sám
a cítils věrné v l a s t i milování.

A přec hlásals - co hned nechápáno,
lidstvo že má sblížiti se víc,
poznat j a z y k zemí bez hranic
jeden spolný - a hle to nám přáno.

Teď již tisícové různých kmenů
snaží svorně za tebou se brát,
pravice své sobě podávat
jako bratři ke cti tvému jménu.

S nadějí jsi stvořil ladá slova
- ejhle Esperanta šťastný vzlet,
s nadějí se hlásí nový svět
a s ním krásná tvoje mluva nová.

El la movado

POLLINGVA GAZETO "GLOS LUDU", aperanta en Ostrava, favoras Esperanton. La redakcio volonte publikigas artikolojn pri Esperanto-movado kaj tradukaĵojn el Esperanto. En lastaj 3 jaroj publikigis pli ol 200 diversajn informojn kaj artikolojn.

EN VARSOVIO. Kvar membroj de Esp. rondeto ĉe ZK ROH de Třinec-ferfabrikoj ricevis pasportojn por partopreni la 44-an Universala Kongreson en Varsovio.

INTERNACIAN JUNULARAN KUNVENON en Gdansk partoprenis 13-jara esperantistino el Třinec, Janka~Blahutová. Ŝi estas ŝajne unusola knabino el Ĉeĥoslovakio, kiu partoprenis en Gdańsk.

TRA NORD-ORIENTA BOHEMIO. Esp.-rondeto ĉe ZK ROH de Třinec-ferfabrikoj aranĝis (11.-15.7.) aŭtobusan ekskurson por siaj membroj kaj favorantoj en nord-orientan Bohemion. Dum la ekskurso estis organizitaj du renkontiĝoj: kun esperantistoj en Náchod kaj Liberec. Ambaŭ renkontiĝoj sukcesis. Oni resumis la agadon kaj spertojn. "En societa amuzo ni travivis momentojn, je kiuj oni ne facile forgesas."

POLAJ ESPERANTISTOJ EN TŘINEC. Esp.-rondeto en Třinec aranĝis (4.7.) en la kafejo KLUB interkonatiĝan amuzan vesperon, kies paŭzojn plenigis finstudintaj instruistinoj de Pedagogia Liceo en Cieszyn per belaj Esperantaj kaj polaj

kantoj.

RENKONTIĜO ESPERANTISTA EN FRÝDLANT n. O. okazis 16.8. Partoprenis 40 personoj, interalie angloj, francoj kaj polo, kiuj rememorigis la 44-an U.K. en Varsovio.

AGADO EN PODĚBRADY. Printempe finiĝis la kurso elementa kaj tuj estis malfermita la daŭriga, kiu konsistas el 20 lecionoj. Ĝi daŭrigos post somera paŭzo. - Esperantistoj partoprenis la unuamajan solenaĵon kaj helpadis en kamplaboroj.

RENASKIĜO DE LA E-MOVADO EN NOVÉ ZÁMKY, nome post pli ol 20 jaroj. Printempe finiĝis kursoj por slovakoj kaj hungaroj (gvidis s. M. Stuchlý kaj s. E. Geleta. Por aŭtuno preparataj kursoj A, B. La publikon oni informas per montrofenestraj ekspozicietoj kaj monata "Kultura kalendaro". Plurloke en ĉeĥaj stratoj oni povas legi "Esperanto parolata". La grupon gvidas spertaj partianoj. La kluba biblioteko jam nombras pli ol 250 librojn. Someran Esperanto-Tendaron partoprenis en 1957: 1, en 1958: 3 kaj nunjare 17 personoj. La plej juna membro estas tri- kaj duonjara Eĉjo (Ernesto) Geleta, denaska e-isto, kiu neniam mankas. Kunvenoj marde kaj vendrede en distrikta kleriga domo (Grémium) inter Esp. radio-elsendoj el Varsovio kaj Romo.

Estis interese, ke antaŭ du monatoj, kiam fama ĉina artisto grupo vizitis nian urbon, la oficiala akompanantino kaj interpretistino petis s-anon Geleta, ke li helpu interpreti (ĉeestis ĉina e-isto).

Gepatroj de la gestudentoj en la hungara 11-jara mezlernejo deziras enkonduki Esperanton en la lernejon laŭ la hungarlanda modelo. Pluraj instruistoj jam memlernas E-on, ĉar ili scias, ke la evoluo ne estas haltigebla kaj proksimiĝas la tempo, kiam ili instruos Esperanton por atingi interkomprenon inter la tutmonda laboristaro. (Estraro de la grupo)

EL LA NAJBARA AMKA DDR (GDR). La 7 Majo 59 pli ol 40 ges-anoj el 15 lokoj inter la riveroj Elbe kaj Neisse ekskurskunvenis en la montara saksa Luzacio. En la programo estis parolado pri D-ro Zamenhof kaj lia verko, filmo de k-do Kl., kiu ŝi faris dum lastjaraj ekskursoj. Esp. kantoj el gramodiskoj, ekskurso. La renkontiĝo vekis intereson en la publiko. El la letero: "Karaj ĉeĥoslovakaj geamikoj, ni arde sopiras al la tempo, kiam ni festos komune belajn kunvenojn, kiam ni havos la eblon ne nur prediki, sed ankaŭ efektiviĝi la amikecon inter la popoloj! Jam nun ni etendas al vi nian fratan manon." Raportis P. Glöckner, Pirna, DDR

"STUDENTO" estas multobligita organo de Studenta Tutmonda Esperantista Ligo (STELO). Peranto por Ĉeĥoslovakio: Josef Sladký, Výhledy 54, Holýšov.

"TAMEN" estas nova multobligita organo de Pola Esperanto-Junularo. Sidejo de la administrejo estas en loko de nunjara 15-a Internacia Junular-Kunveno, Gdańsk (ul. Garncarska 18, "Esperanto", Pollando).

TENDARA PELMELO

DIREKTE AL "S E T"

Sub somera varma sun'
ĉiun regas oportun'.
La oportun'— pro varma sun'—
pelas nin al la natur'.

El la urboj fuĝi for
estas nia sana mor':
La junular' kaj infanar'
en plenegaj vagonar'.

Urboj, kampoj kaj natur',
ĵus aperis mast' kaj tur',
kaj vidu jen — jen nia cel',
la tendar' sub verda stel'.

Sunopluga karusel' —
jaĥtas ni sub blanka vel'
post vala bar' kaj en tendar'-,
ŝercas ni kun tondra mar'.

Ĉeĥa knabo kun fremdul'
ĉe amuzo kaj en kurs'.
Sunvivas ni en harmoni',
Esperanton studas ni.

J. M. M.

SED/SET NE SEN TURMENTOJ

Oni diras, ke mi estas knabo "ŝmirita", aventuroj neniam min ĉagrenigas, sed ne kredu! La vojaĝon al la tendaro mi komencis en Ostrava tute malsana. La unua aventuro trafis min dum mia halto en Přerov, kie mi forgesis en stacidoma deponejo pakajon kun kovriloj. Mi estis do devigita reveni. Poste mi haltis en Výškov ĉe la gepatroj, ili jam kompreneble dormis. Provu kiel agrable estas salti trans barilon kaj tuj resalti por savi vin antaŭ mortaĉo en dentoj de nova hundo de la gepatroj. Tamen mi poste sukcesis kaj venis senakcidente en provizejon, kie mi formanĝegis preskaŭ ĉion. La reston mi kunprenis. Por ke mi forigu mian malsanon kaj ĉefe koldoloron, mi uzis prunbrandon kaj kun plenŝtopita tornistro da bongustaĵoj mi ŝteliris silente por ne vekti la gepatrojn, adiaŭis la hundon kaj foriris al stacidomo. Senakcidente mi atingis Vranovon.

En la stacidomo bonvenigis min miela rideto de SET-deĵoranto. Li aspektis sufiĉe kredinda, mi ne sentis, ke liaj informoj pri signoj kondukantaj al la tendaro estas artifiko. Mi sperta turisto, ne volis atendi sep horojn ĝis forveturo de aŭtobuso

kaj tuj mi devigis geamikojn Věra kaj Břet'a piedpaŝi al la tendaro. La ceteraj, platpiedaj kaj senspiraj esperantistoj, prefere ripozis. La 8-kilometran vojon al Lančov ni foriris dum du horoj. Nia unua halto estis en gastejo. Enviante mi rigardis la gekamaradojn, kiel ili frandemis trinkante malvarman bieron. Por ke ni estu baldaŭ en la tendaro, mi denove ilin devigis daŭrigi laŭ la signo fiksita sur arbo ĝuste apud la gastejo. Neniu sciis kio nin atendas. Mi jam imagis al mi gloran alvenon en la tendaron. Sed post senfina supreniro mi komencis malbeni kulojn kaj informojn en la prospekto, ĉar la distancon 2 km ni jam trairis duoble kaj la tendaro nenie. Proksime de ruinaĵo Cornštýn iu homo respondis al ni: "Arĝenta golfo troviĝas proksime de la vilaĝo Lančov, sed tute aliflanke, vi devas reiri!" Ĉar akompanis nin knabino, mi plirapidiĝis kaj neaŭdebla de ŝi mi insultis per abomenaj vortoj tendar-estraĉon. Senripoze ni revenis al Lančov kaj en la gastejo mi fortrinkis du bierojn ne rigardante mian sanstaton. Agrabla vilaĝano sciigis nin poste pri arbovojo al Arĝenta golfo. Ni ĝoje daŭrigis kaj kiam ni ekvidis tendojn, tiam ni kuris kaj kriegis "Saluton!" - Ho, teruro, pioniroj. Rido mortis sur nia vizaĝo kaj apatie ni devestis la ŝuojn kaj trempis ŝvelojn sur la piedoj en akvo. Iu sinjorino poste pruntis al ni ŝipeton, sed ĝi estis kvazaŭ ensorĉita, ĉar ne kaj ne celis rekte. Eble tio estis mia kulpo, mi estis unuafoje remanta. La duan golfon ni atingis jam dum vesperbriloj kolorigis ĉielon kaj sur bordo mi sentis la saman feliĉon en koro kiel Kolumbus ĵus atinginta Amerikon.

Tendaro! Ne ekzistas vortoj, per kiuj ni povus esprimi nian feliĉon kaj kun ŝuoj en la manoj ni rapidegis al la tendaro. - Diablo prenu ĉion, estis miaj unuaj vortoj traleginte bonvenigan surskribon "Estu preparita"! Sed ni ne estis preparitaj kaj kvazaŭ ŝtonoj ni falis sur teron. Per duonplorantaj okuloj ni rigardis je pioniro, kiu celis al ni kaj poste kondukis nin al nia tendaro kaŝita apude, malantaŭ la rivereto. Entuziasmigitaj ni forgesis fortranĉi la kapon de la estraĉo kaj ĵeti ĉion, krom provizoj, en la lagon, kiel ni dumvoje decidis.

Insultinte tendaranojn, ke ili ne preparis niajn litojn, mi ĝis la dekdua horo konstruis tiun ĉi kaj poste enlitiĝis. La amiko Břet'a dek minutojn post mi ankaŭ forĵetis najlojn, martelon kaj sidiĝis sur la liton. Sed teruro, ŝi disiĝis kaj falis. Pro rido mi tremis tiom, ke ankaŭ mia lito ruiniĝis. Tiunokte mi dormis sur la tero.

Jiří Kolečka

J u l i a n T U W I M:

N i g r a n o k t o

Trad. Marek Wajsblum

Homo ŝarĝon portanta,
Sidu kune.
Ni silentu, ni atentu.
Nokt' sen luma.

Teren metu
La kverkan keston
Kaj ripozu
En nokton kune ni fiksos

kulojn homajn.

Penas vortoj. Pezas ŝarĝo.

Pano ŝtona.

Vanas vortoj. Jen ŝtonoj du

En nokto drona.

ĈU PRISILENTI?

En urbo troviĝas multaj komfortigiloj de la vivo: fumo, bruo, freneza tempokuro ktp. Tiujn, kiuj volas sin savi fuĝante provincon, la naturo rekompencas per kuloj, formikoj, falenoj, pluvo kaj agrablaĵoj el sia riĉa provizo. Jes, en Červená nad Vltavou oni aldonas malprofundan riveron, kelke da tendoj, kvarpecan inaron kaj "Tobruk", ĉar tie troviĝas SET?

Severa estas vivo en militistaj tendaroj, malmilda en la civilaj – kaj tute anarkia en la esperantistaj. Tamen, kelkio severa, eĉ militista ĉeestis. Ekzemple la tendoj prunteprenitaj de la armeo. Ili estas plej interesaj aĵoj ĉi tie. Ekstere ĉiuj similaj, interne variaj, same kiel diversa j estas la homaj ecoj, kaŝitaj en interno de (eble) nelavita manĝ- kaj lit-avida homa korpo.

La porestra tendo estas rekonebla laŭ krio kaj fajfado farata antaŭ ĝi frumatene de tendanaro (frumatene= 7,30 ĉi tie). Tia bruo estas necesa por veki ambaŭ estrojn. Apude staras tendo de kuiristinoj kaj de ties infanoj. Do, tendo ofica. Najbaras la tendo kuirejo, kie troviĝas ankaŭ provizejo, neoficiala manĝejo kaj rezidenco de sinjoro dommastro. Kontraŭe troviĝas tendo por normalaj kursanoj, ni povus diri tendo porhoma. Ceterajn du tendojn okupas inoj.

En tendara vivo la ĉefa tasko estas studado. Kaj vere, ĉi tie oni detale pristudas diversajn aferojn: malkonstrui tendon de virinoj, kiel kunĝlui ion similan al bivakfajra programo ktp. Plej profunde oni studis botelon de bulgara brando – ĝisfunde. Kelkaj fervoruloj eĉ provis lerni Esperanton!

Al la tendara apartenas ankaŭ boato servanta same (aŭ nure) kiel submarŝipe (pruvite).

Plejparto da homoj kontentiĝis en libera tempo per du aĵoj: matraco kaj kuseneto. Eĉ por banado oni uzis matracon. Sekve, la tendara vivo estis sufiĉe mola.

V. Kalivoda

J. Marek: KURSANINO

Kursanino ĉarma
la tendaron venis,
dum la tago varma
lerni ŝi ne emis.

Ho, ĉarma kursanin',
en kia vi ŝvebas inklin'?'
Jen vi, tendar-fein',
studegi nun devos ĝis fin'!

Sun' kaj bano logas,
ŝi en hor' adora
ame dialogas,
antaŭ knaboj gloras.

Ho, ĉarmas kursanin',
en kia vi ŝvebas inklin'?
Jen vi, tendar-fein',
studegi nun devos ĝis fin?!

Ekzameno venas,
kursanino svenas,
vorton ne komprenas,
noto nubmienas.

Ho, ĉarma kursanin',
en kia vi ŝvebis inklin'?
Jen vi, tendar-fein',
logeme petolis ĝis fin'.

INTERVJUO EN "SET", KIU DANK' AL DIO — NE OKAZIS.
(Prezentita de ERINACO en Ostrava-Vítkovice la 6-an de majo 1959.)

Malantaŭ kulisoj okazas matena ekzerco. La estro kalkulas: Unu - du, unu - du,...

Tendarano: Unu - du. unu - du.... (ekzercas:

Ĵurnalisto: Buenos, muĉaĉo! Ĉu vi ankaŭ apartenas al tiuj pedikuloj, kiuj je la sesa horo matene vekas ĉiujn homojn en vasta ĉirkauaĵo per hurona krio?

T: Mi? Pedikulo? Gardu vian sanon!

Ĵ: Atentu! Mi estas František Vomáčka, redaktoro de la ĵurnalo "Bobkový list". Mi bezonas materialon por ia artikolo. Ĉu vi povas respondi kelkajn miajn demandojn?

T: Nu, se vi lasos la pedikajn ofendojn.

Ĵ: Kompreneble Vi estas bona knabo. Do, mi volas en nia ĵurnalo priskribi vian entreprenon kaj rekomendi studadon de Esperanto, ĉar mi scias, ke jam Komenský aprobis Esperanton kaj ke 100 milionoj da homoj estas "esperantoj". - Do, kia estas via nomo?

T: František Zelňačka z Povidlova.

Ĵ: Kaj la plua demando: Ĉu vi ankaŭ lernas Esperanton?

T: Jes.

Ĵ: Do, vi lernas Esperanton. Kaj ĉu vi povas diri al mi, kiel longe oni devas ĝin studi?

T: Ne.

Ĵ: Ĉu ne? Mi ne komprenas al vi. Vi ja certe scias proksimuman tempon, kiun oni bezonas por ellerni Esperanton?

T: Ĝi dependas de grado de stulteco.

Ĵ: Sinjoro Zelňačka, vi certe volis diri "de talento", ĉu ne? Nu, krome mi deziras scii,

kiom da homoj estas en la tendaro?

T: (kalkulas je fingroj, silentas).

Ĵ: Ĉu vi estas multaj?

T: Jes.

Ĵ: Bone, kaj ĉu vi ĉiuj estas junaj?

T: Jes.

Ĵ: Kiu estas la plej juna kursano en la tendaro?

T: Pepíček.

Ĵ: Pardonu, mi devas ĉion noti, por ke mi havu abundan materialon por la artikolo –
Do, ankoraŭ mi havas ion por demandi. Ĉu vi estas kontentaj kun la vetero?

T: Jes.

Ĵ: Ĉu plaĉas al vi en la tendaro?

T: Plaĉas.

Ĵ: Mi nepre devas rekomendi al la publiko ĉeeston en via entrepreno. Sed, kiel ĝi
oficiale nomiĝas?

T: SET.

Ĵ: Sed, kiel ĝi oficiale nomiĝas?

T: SET.

Ĵ: Sed, vi eble ne komprenas. Mi demandas, kiu estas oficiala nomo de via tendaro?

T: Nu, S-E-T.

Ĵ: Ah, ĝi estas ia mallongigo, ĉu nevere?

T: Jes.

Ĵ: Kaj fine mi bezonas ian felietonan motivon. Aŭskultu! Kiam mi estis alvenanta, la
kursanoj havis matenekzercon, gimnastikon. Vi gimnastikis tie ĉi flanke. Ĉu vi
povas diri al mi, kion vi ekzercis?

T: (ekzercas) Unu - du, unu - du,...

Ĵ: Ĝi estas ia modera gimnastikado. Ĝi ŝajnas esti por sporte netalementita maljunularo.

T: Ne! Ĝi estas preparo por la ekzamenoj. Haha.

Ĵ: Por la ekzamenoj? - Ha, bonege! Bonege! Ĝi estas nova Esperanto. Esperanto
Nova, vere internacia: (gimnastikas laŭ la tendarano) Mi-ne-aci-as, mi-ne-sai-as,...
Jes-jes, jes-jes,... ne-ne, ne-ne,... Sinjoro Zelňačka, dankon al vi! Mi jam havas la
motivon. Ĝi estas vera spico, Ĝi estas sensacia bombo. La legantaro estos
surprizita. (ekzercas) Jes—jes,...

T: (ekcercas) Mi-ne-sci-as, mi-ne-eci-as,...

Ĵ: Dankon, sinjoro Zelňačka. Interlingvistoj falos en konsterno. Du miliardoj da
"esperantoj" en la mondo. Harhirtiga bato por idistoj! Da miliardoj da "esperantoj".
Ĝis la revido, sinjoro Zelňačka!

T: Ĝis!

Juro Mevo

ENIGMA KURSO

Solvoj el la 2-a numero: 1. horo - ĥoro.

2. kor' doloris - kordo ploris.

G.P.: GRANDPOEM' PRI VIV' SENPENA EN TENDARO DE ĈERVENÁ.

Post preparad' abunda
al grava stud' ĝisfunda
alvenis ni tendaron,
formante nur malaron,
kun fajra am' enkore
por lerni tre fervore.

El Lanžhot venis saĝa
esperantist' grandaĝa,
tre sperta, vigla homo,
Paĉina lia nomo.

Li varbas ja multare
aŭdantojn vagonare,
kampare, enarbare,
por la afer' senĉese
laboras li sukcese.

Li volis porti ordon
en nian etan hordon;
ne estis li maligna,
proviz' atestis ligna,
ke liaj lertaj manoj
faris por tendaranoj.

Baldaŭ adiaŭ diris
kaj ree li foriris.

Ho, trist' por ĉiuj! Ili
parolis ofte pri li.

Plua aperis gasto
apud tendara masto,
E-isto malnovdata,
Pařík bonvenigata.
Sendube ĉiu vespo
malbona estas besto,
iu ornamis pentre
per pik' lin surventre.

Afer' ne estis eta.
ke profesor' Beleta
eloriente venis,
tendaron partoprenis,
nivelon altan tenis.
Por ĉiuj estis io,
ke ĝuste Varsovio

parolis pri li laŭdon,
tiklante lian aŭdon.

Virinoj sendiskute
silentis, sidis mute,
en Perner timis urson,
kiu atakis kurson.
Perner, Johan' la Brava,
gramatikisto rava,
zorgplene nin instruis,
ni ĉiuj multon ĝuis.
Jes, estis por ni bono
ke ĉiu leciono
povis okazi nure
ekstere, ennature.
Dum pluv' — je nia plendo
ni lernis ja en tendo:
Al Perner unu fojon
kaŭzis la vent' malĝojon,
subite ĝi alvenis,
folion al li prenis,
eklevis la paperon
kaj pelis trans riveron;
falis foli' sur teron
sur la bord' "holanda"
apud la arbarrando.
Sed Perner senhezite,
la fiveteron spite,
aŭdaca kiel Nansen
rapidis vadi transen,
baldaŭ folion venke
metis en tend' surbenke.

La samideaninoj
kiel aliaj inoj
je viraĉar' ĵaluzis
kaj langon tranĉe uzis,
kiam ĉe l' tendarmastoj
montriĝis inaj gastoj.

La kuiristinaro
konsistis nur el paro.
Ili, virinoj lertaj,
ĉiudirekte spertaj,
preparis bonan nutron,

neniam aĉan putron.
Ĉiuj malriĉaj homoj,
kontentas pri terpomoj
kaj ankaŭ nin sufiĉis,
se inoj ilin spicis.
Naturo tre avare
konduitis - enarbare
boleto ne aperis,
ni ĉiuj ĝin preferis.
La kantarel' modesta
manĝaj' ne estas festa,
ankoraŭ ni ĝin amis,
se supon ĝi ornamis.

Kun zorgo preskaŭ panja
restoraci' de Vanja
gastigis nin malrare,
irantajn tien are.
Kelk-paŝojn nur proksima
ĝi estis log' senlima,
ĝis nun en historio
ne estis tia io,
mira afer' en vero -
tendaro kun biero!

Ho, nokto j vi trankvilaj,
silentaj, kun centmiloj
da steloj surĉiele!
La luno lumis hele,
bril' ĝia strange pala
en la profundo vala
mirindan ĉarmon havis,
la sendormulon ravis.
River' potence fluis,
la ondoj muĝis, bruis,
nebulaj strioj torde
dancis sen ĉes' surborde.
Ho, noktoj vi trankvilaj,
vi ĉiam estis brilaj!

Konturo plaĉa, mola
de korpo kapreola
ekaperadis ofte
dum frumateno softe
proksime sur deklivo

super tendar' sen vivo.
La besto iam blekis,
kaj nin el dormo vekis.

La Rukaveĉ-bredparko,
signifa turist-marko!
La voj' nin tien gvidis,
volonte ni ĝin vidis.
Ĉaskastelet' malnova
kun pasintec' senpova
regalis foje stelojn
de l' societ' - nobelojn.
Apud la dom' kaduka
herbejo kuŝas suka,
jen estas la embusko
je cervoj dum krepusko.
Sovaĝaj aproj anke
vivas ĝis nun senmanke
en la bredpark' tiea.
Sed ĉi bestar' pasea
en la arbaroj vastaj
ne montris sin al gastoj.

Zvíkov, la lok' glorfama,
por ĉiu hom' sciama
'de longe ĉiam celo.
Ĝi estis reĝkastelo,
super riveroj vere
dominas ĝi fiere.
Ni ankaŭ malhazarde
rapidis al ĝi arde
kaj ĝuis perrigarde.
Grupeto nia tenda
kun dam' kuniris fremda,
kiu ĉi tien venis.
Do kune ni promenis
senhalte parolante
kun ŝi nur Esperante.

Adiaŭ, val' rivera
kun la tendar' somera!
Nur restas rememoroj
pri la agrablaj horoj,
pri niaj instruistoj
kaj fremdlandanoj distaj,

pri la arbaro ombra
kaj la rivero sombra,
pri flugetemaj mevoj
kaj kuirhelpaj devoj,
pri dumvesperaj kantoj
kaj trajnoj ruliĝantaj.
sur alta pont' fervoja,
pri' viv' senzorga, ĝoja.

Nu, la poem' rakonta
pri nia viv' ĉeponta
jam havas sian finon.
Ĝi estu enfalonta
en la forgesan sinon!

SET-Vranova valdigo 1959 LA VOJETO DE KURAĜULOJ

Vespere la kvaran tagon anataŭ fino de la tendumado apud la valdigo Vranov, ĉiuj loĝantoj en la tuta proksima ĉirkaŭaĵo paliĝis kaj ekstremitis aŭskultante difuzajn sonojn en aero. Ordinare senbrua arbovojo kondukanta al vilaĝo estiĝis danĝera. Teruraj spiritoj kaj fantomoj festis tie nokton de amuzoj ne ri gardante tion, ke ĉiu tendarano estis devigata tiutempe pasi tra la vojeto por montri, kiel li scias orienti sin nokte en naturo. Ne nur unu kuraĝulino post reveno en la tendaron rapidis al "tobruko". Tra la tuta tendaro aŭdiĝis dentklaketado. Imagu, kio al mi okazis venontan tagon. Rigardante la pejzaĝon mi hazarde renkontis iun fantomon kaj ĝi permesis al mi intervjuon pri la nokto.

"Proksime de la tendaro", ĝi diris, "dancis mia intima kolego, Bubao ĉirkaŭvolvita per blanka litotuko kaj invitadis preterirantojn: "Venu, tendarano aĉa, mi preferas Esperantan viandon, he, hi, hi!" Preskaŭ dek metrojn post ĝi, en plena mallumo, staris la kolego Bacbuo, kiu per kovrilo punbatis silente ĉiun kuraĝulon. Apude blekante mi movigis pendigiton kaj de tempo al tempo mi ĝin prilumis. Tendaranoj aĉaj ekstremitis kaj kriegante forkuris al la loko, kie streĉita kablo faligis ilin teren. La koleginino Huibuo klopodis frenezigi ilin per sia mizera voĉo. Preter la vojeto post ŝi estis kaŝita aro da spiritoj senĉeĉee blekantaj. Sed nia tre agrabla amuzo estis subite interrompita. Al la kolego Bubao proksimiĝis iu estaĵo kaj Bubao kriis ĉeĉe: "Hi, hi, viktimo mia, tremu, vi mortaĉos tie sur formikejo, he, ho, hi!" La estaĵo nek tremiĝis, nek forkuris, sed bruligis alumeton ĝuste kiam Bacbuo estis plenumanta sian taskon. Ho, teruro ekregis nin, fantomojn. La estaĵo estis policisto. Por savi nin estis jam malfrue, ni ŝtoniĝis pro timo. Kio nun sekvas? Sed la policano nenion diris kaj daŭrigis preter la pendigito, ĝis la enurego faligis lin. Ni ekaŭdis lian murmuron samtempe kun voĉo de Huibuo."

Mi jam ne povis silenti, neĝentile mi interrompis parolon de la fantomo kaj senpaciencie mi tenis notlibron. Sed ĝi malaperis.

En la tendaro mi demandis la estron Paŭlon, kiel la afero kun policisto finiĝis,

ĉar li staris en fino de la vojeto kun ĵus rekrutitaj gekuraĝuloj. Li diris al mi pri sia surprizo ekvidante policiston. La policisto ridis kaj permesis al scivolemaj knabinoj esplori, ĉu li plenumis eminente la kuraĝ-ekzamenon.

De tiu tempo fantomoj jam ne reaperis kaj silenton de ĉarmaj vesperoj rompis nur molaj tonoj de soneto kaj krakado de bivakfajroj.

Jiří Kolečka

JUNULARA MOVADO ESPERANTISTA EN ĈEĤOSLOVAKIO EDUKIS JAM MULTAJN ESPERANTO-INSTRUSTOJN. NUNJARE EN LA TENDAROJ INSTRUIS 15 EL ILI: O. Kníchal, Vl. Novotný, J. Werner, Dr. Kočvara, M. Lorková, Fr. Nymburský, Vl. Kočvara, V. Podhradská, N. Jirečková, R. Wolkowinský, Č. Závodný, J. Kolečka, M. Matušková, D. Berndt, K. Franc.

Laŭ lasta sciigo instruas en SET Ĉervená n/Vlt. III-a et. nia eminenta lingvisto kaj poeto, tradukisto, profesoro Miloš Lukáš el Hradec Králové.

NOVAJ INSTRUISTOJ:

Nunjare sukcesis en D-ekzamenoj (pri kapableco instrui) 4 viraj esperantistoj.

Enkrampe ni citas titolon de diploma tasko:

Zd. Čapek el Praha (rakonto – libera temo),

D–ro O. Franzl el Brno ("Esperanto kaj ŝakludo"),

E. Geleta el Nové Zámky ("Historio de urbo Eger"),

B. Štefek el ("Nova teknologio en la bestbreda produktado)

KIOM DA PARTOPREPANTOJ ESTIS EN "SET-59"? Laŭ provizora kalkulo 120 kursanoj kaj 30 okupitoj (gvidantoj, instruistoj, kuiristino).
--

J.A.Komenský:

Ĉiu klera homo ĝenerale ju pli bona kaj nobla estas, des pli estimas la naturon. Kiu scias estimi la naturon, tiu ankaŭ amas ĝin. Amo al la naturo estas instruinda al infanoj en familioj, lernejo kiel unu el la plej gravaj ecoj de l' homo."

Skribis al ni

D–ro Aug. PITLÍK (Praha), membro de la Akademio de Esperanto, estinta lektoro pri Esperanto en Teknika altlernejo en Praha, skribas al ni: "N–o 1–a de Fajrero estas tre interesa. La poresper. laboro de la Junularo estas laŭdenda. Amikan saluton?"

Saluton el varmega suna Uzbekistano sendis al ni s-ano A.P.DROSDOW el Taŝkent. El lia letero: "Vi faris al mi grandegan ĝojon sendinte la 1-an numeron de Fajrero. Nova semo – novaj esperoj – kiel diras rusa proverbo. Mi tutanime salutas la aperon de tiu nova, vere bela, ankaŭ flankenhave, preparita Esperanta legaĵo,..."

S-ano Andor LACZKÓ el Esztergomtábor (Hungario): "...Kvankam mi ne estas ĉefo, tamen de "la unua litero ĝis la lasta mi tralegis la gazeton Fajrero, ja ankaŭ mi estas juna, krome ankaŭ min interesas, kiel laboras kaj vivas la ĉeĥaj geesperantistoj..."

NI NE KAPABLAS TUJ RESPONDI LETERE AL ĈIUJ SKRIBINTOJ.– ĈIUJN SALUTOJN NI SAME SINCERE RECIPROKAS!

LEKANTETO

F. Omelková:

P r i t i m e m a P u n t a .

En dometo apud arbaro loĝis hunda panjo kun sia fileto Punt'a. Dum la tuta nokto ŝi iradis sur la korto kaj gardis. Punĉa kuŝis en la budo kaj dormis. Foje vespere la panjo diris:

"Punt'a, mi ne sentas min bone hodiaŭ. Vi estas jam sufiĉe granda, vi povas mem gardi. Mi restos en la budo."

"Tiel okazis kaj Punt'a eliris sur la korton. Sed jen ĝi ektimis! Ĉie estis mallume kiel en poŝo. Ek! kaj ĝi kuregis en la bildon al la panjo.

"Pro kio vi ektimis, Punt'a?" demandis la panjo.

"Pro la mallumo!" diris Punt'a kaj ĝi tuta tremis. "Ho, Punt'a! Vi ne devas timi la mallumon! Ĝi ne faros al vi malbonaĵon! Nur la suneto foriris dormi. Iru nur kaj gardu!"

Kaj Punt'a iris. Ĝi iradis preter la barilo kaj parolis al si: "Mi ne timas? Ĝi ne faros malbonaĵon al mi. Nur la suneto foriris dormi." Subite ekululis strigo: "Uluuul! Uluuul!" Punt'a terure ektimis. Ek! kaj ĝi kuregis en la budon al la panjo.

"Pro kio vi ektimis, Punt'a?"

"Pro la timigaĵo! Ĝi faris kontraŭ mi: Uluuul! Uluuul! Uluuul!"

"Ho, Punt'a! La timigaĵoj ne ekzistas! Nur la strigo ululis. Vi ne devas timi ĝin! Iri? nur kaj gardu?"

Kaj Punt'a iris kaj parolis al si: "Mi ne timas la timigaĵojn. La timigaĵoj ne estas. Kaj ankaŭ mi ne timas mallumon. Mi timas nenion. Jen antaŭ ĝi ekbrilis lumeto. Punt'a ekkuregis al la budo.

"Punt'a, Punt'a! ne kuru for!" aŭdiĝis malantaŭ ĝi. Punt'a demandis timeme:

"Kiu min vokas?"

"Tio estas mi - lampiro. Ĉu vi ne vidas mian lumeton?"

"Mi vidas!" diris Punt'a kaj iris malrapide al la lumeto. Kiam ĝi ekvidis malgrandan insekton, gaje ĝi ekridis:

"Ho, vi estas malgrandeta!"

"Kaj vi tiom ektimis min! Kia timema vi estas!"

"Ĉu vi ne timas?" demandis Punt'a.

"Mi ne timas."

"Ĉu vi ne timas ankaŭ la mallumon?"

"Kial mi timus la mallumon? La mallumo ne faros al mi malbonaĵon. Nur la suneto foriris dormi."

"Kaj ĉu vi ne timas la timigaĵojn?"

"Ja ne estas iaj timigaĵoj!" ekridis la lampiro.

"Kaj kiam la strigo ululas?"

"La strigo ululas, mi lumas kaj vi havas devon gardi. Ĝis revido, Punt'a! Kaj ne timu plu!" vokis la lampiro.

Punt'a per rigardo sekvis la lumeton kaj poste ĝi ekbojis, kiom plej multe ĝi povis.

Trad. Adolf Staňura.

EL KAJERO DE ONKLO PAŬLO – BUDAPEŝTO:

KALKULADO POR INFANOJ.

UNU	- pro falet' ne punu!
DU	- kun mi gaje ludu!
TRI	- vokas birda kri'
KVAR	- venas la najbar'
KVIN	- mi tre amas vin.
SES	- diru al mi: jes!
SEP	- estu bona nep'!
OK	- forkuris la kok'
NAŬ	- hundo bojas-vaŭ,
DEK	- sonas ŝafa blek' jen la lasta strek'!

KIO ĜI ESTAS? - solvo de la infanaj enigmoj en la 2-a numero: 1. boleto, 2. fera ĉeno, 3, leono (Luno, Elbo, Oble, Neĝo, Osto). N.J.

Konkurso *de fajrero 1959*

Ĉu kredi, ke nur 7 legantoj partoprenas la konkurson? Ĝis la 9-a de aŭgusto sendis la taskojn: Zd. Rejdlová (Třebíč), J. Kolejka (Ostrava), Zd. Rusín (Klatovy), J. Patera (Most), F. Maděryč (Havířov), Vl. Novotný (Praha), M. Valešová (Liberec). Kion faras legantoj precipe en Třinec kaj Ostrava? "Fajrero" ja estas ilia bulteno!

Pritakson ni faros por ĉiuj 6 taskoj samtempe en speciala komisiono. La modelaj tradukoj konkursaj estas publikigitaj en venonta numero, tial vi povas amase partopreni ne nur per lastaj du taskoj, sed ankoraŭ nun elserĉi la 1-an kaj 2-an numerojn kaj sendi ĉiujn taskojn. Ne preterlasu la lingvan ekzercon! 5 plej sukcesaj konkursantoj estos premiitaj per valoraj Esperantaj libroj!

jw

ĈU FAJRERO-KONKURSO INTERNACIA?

Samideano Andor Laczko el Esztergomtábor (Hungario) skribas al ni:

"... La plej bona maniero de kunlaboro estu, se pere de la gazeto FAJRERO ni povus anonci ian internacian literaturan konkurson. Nature, la konkurson povus partopreni ne nur ĉeĥaj kaj hungaraj esperantistoj, sed ankaŭ alilandaj samideanoj. La konkurso povus akceli la pli rapidan lingvoprogreson kaj ĝustan lingvoscion, krome ĝi mem tutcerte entenus ion interesan. Mi pensas, ke multe da junaj gesamideanoj volonte partoprenus la konkurson."

Ni konsentas, sed tamen ni metas la proponon por pridiskuti inter la legantaro. Ĉiujn proponojn kaj rimarkojn bonvolu sendi baldaŭ al la redakcia adreso!

KATEGORIO I – tasko 5-a: traduku:

1. Spatřil jsem překrásný kraj. 2. Mám svůj názor. 3. Podnik (pořad) krajského

mĉritka. 4. Jdu za řeku. 5. Pĉelořil jsi to dobře.

KATEGORIO II - tasko 5-a: tradaku:

1. Spatřil jsem kraj v plnĉ jeho krĉse. 2. Kařdĉy mĉame svĉj nĉzor, jĉ svĉj, vy vĉř. 3. Jeho umĉnĉ dosahuje svĉtovoĉo mĉřitka. 4. Pozdĉji i jĉ poplavu za řeku. 5. Shledal jsem pĉeklad sprĉvnĉm. -

KATEGORIOJ I,II - tasko 6-a: Skribu al ni vian opinion pri la propono de s-ano A. Laczko kaj esprimu vian kontenton aŭ malkontenton pri la nunjaraj konkursaj taskoj, proponu plibonigojn por la venonta jaro.

La konkursajn taskojn ni akceptas ĝis fino de septembro.

Redakcio

NI DISKUTAS PRI INFORMADO

"Pri informado - pli bone; pri la varbado: Jam antaŭ jaro mi decidis, ke mi laŭeble tradukados mallongajn rakontojn de verkistoj, vivantaj en nia regiono. Unu rakonto jam estas en eksterlanda redakcio de E-revuo, baldaŭ ni sendos pluan. Mi opinias, ke per tia agado ni inklinigos al nia afero la intelektulojn. Ĉu povus ankaŭ la Fajrero publikigi, similajn tradukojn (eble eĉ poparte)? Tiun aferon povus primediti ĉiujn tradukopovaj gesamideanoj. Tradukante aŭtorojn glorajn, sed nevivantajn, ni ne multe faras por nia afero. Kaj ankaŭ ne multe, por la aŭtoroj mem, ĉar ili jam estas konataj eksterlande per tradukoj nacilingvaj. Konsiderante la kvaliton de la tradukota verko ni ne forgesu, ke ĉiu nur iom bona aŭtoro jen-tie skribas rakonton, kiu laŭ la homa vidpunkto kvazaŭ fontus el la idealoj de la esperantismo: homamo, proksimigo de diversaj rasoj k.s.

A. Staŭura

"Ĉu estus eble konigi en unu el viaj estontaj n-roj de la Fajrero la devenon de la 13-a punkto el la "Fundamenta principaro de informado pri la Internacia lingvo"? Kiun mi demandis, neniuj ĝin konis." Respondo: JARLIBRO UEA 1959, pĝ. 186-190.

"Esperanto" ja estas nur helpa lingvo. Respondo: Jes, ĝi devas helpi en internaciaj rilatoj. Sed la vorto "helpa" sentigas, ke temas pri provizora lingvo, kiu povas "en certaj kazoj" helpi, (kvazaŭ malperfekta, malpreciza).

Pluajn rimarkojn, observojn ktp. sendu al red.

Libroj – prospektoj - recenzoj

"POR NOVA AFERO, NOVA MANIERO". Eldonis: Ĉina Esperanto-Ligo, P.O.Kesto 77, Pekino, Ĉinio. 13 x 18 3/4 cm, 202 pĝ., broŝurita, prezo 2 rubloj, 0,45 us.dol.

Dek du noveloj de nuntempaj verkistoj kun antaŭparolo de Maŭ Dun, prezidanto de Ligo de ĉinaj verkistoj. La noveloj respegulas diversajn facetojn de la lukto kaj spirita fizionomio de la ĉina popolo, en milito kontraŭ la reacia reĝimo kaj en ĉiutaga vivo, antaŭ kaj post la liberiĝo. Ĉiu peco prezentas interesan temon por alilandaj legantoj.

Klarigoj kaj bibliografiaj notoj estas aldonitaj. La noveloj estas selektitaj el la malnovaj kolektoj, unu samtitolita kaj alia titolita "La Feliĉo"; ambaŭ elĉerpitaj.

Espereble la eldonaĵon importos "Kniha" en Praha. La aĉeton kaj tralegon ni nepre rekomendas al ĉiu e-isto kaj la klubo. M.

NOVA ESPERANTO-PROSPEKTO "NÜRNBERG". La pli ol 900 jara urbo Nürnberg estas kultura kaj ekonomia centro de Germanujo. Ankaŭ pri abunda arthistoriaj vidindaĵoj raportas la nova, bela, 8-paĝa prospekto.

Ni atentigas, ke en "Nürnberg estis fondita 1888 la unua E-grupo de la mondo, 1889 aperis en Nürnberg la unua E-gazeto, "La Esperantisto". En la j. 1923 okazis tie la 15-a U.K., ĉeestis 5000 esperantistoj. La prospekto estas ricevebla de: Verkehrsverein Nürnberg E.V., Hauptmarkt 18, Germanujo (okcidenta).

FONOSTENOGRAFIA ILI SLUĤOVAJA SKOROPIS de Olga Sergejevna Aleksandrova, menciita en 1-a numero de Fajrero. Ĝi estas grandformata, 26,3 x 174 duontola bindo, bela blanka papero, preso senriproĉa. Ĝi estas tre lerte verkita ruslingve kaj enhavas mallongajn tekstprovaĵojn en 7 aliaj lingvoj: moldavia, ukraina, blankrusa, bulgara, germana, angla kaj Esperanto. - Laŭ ricevitaj informoj aĉetebla en "Sovetskaja kniga," en Brno. En Sovetio mendebla ĉe: "Kniga poĉtoj", str. Frunze 63, Kiŝinev, Moldavia SSR. Ast.

"VIETNAMIO ANTAŬENMARŜAS" estas nova kultura kaj socia trimonata revuo en dukolora kovrilo, ilustrita. Prezo: 3 rubloj = 0,5 us.dol. Mendebla ĉe: SO XUAT HNAP KHAU SÁGH BÁO 32, Hai Ba Trung - Hanoi, Vietnamio. Antaŭ ĉe: S-ro NG - V - K ĉe Vietnama Ambasad, Moskvo, Sovetunio.

ANONCETOJ:

- Dona nian adreson al ĉiuj, kiuj volas interŝanĝi markojn alumetetiketojn: Kolekcioner Klub, Raczek Łódz, Piotrkowska 211, Pollando.
- "Tridek jaroj en la ora nordo" (Welz) estas serĉata. Kiu povas vendi la libron, skribu al: Simon László, DEBRECEN, Domokos Lajos utca-9, Hungario. Aŭ al: E. Geleta, prof., Nové Zámky, Slovakio.
- Ĉu vi serĉas junan britan korespondanton? Esperanta-Junularo Brita havas koresp. servon. Skribu al: S-ino B.M. Delgado, 58 Albert Road, TAMWORTH, Staffordshire, Anglio. Ne forgesu indiki viajn: aĝon, sekson, intereson, preferojn kaj adreson.

Pluraj legantoj resendis la 2-an n-ron kun aŭ sen mencio, ke ili ne deziras ricevadi Fajreron. Bedaŭrinde kelkaj forgesis skribi sian nomon aŭ forŝiris la adres-folieton. Adm.

FAJRERO estas bulteno de junaj esperantistoj en Ostrava-regiono. Aperas laŭbezone.

AŬGUSTO 1959 N-ro: 3

ELDONAS: ZK ROH Třineckých železáren VŘSR

Esperantský odbor.

REDAKTAS: Jan Pomykacz, Inĝ. Jan Werner (resp.)

RED. ADRESO: Fajrero, OSTRAVA 15, Na Lachu 6.

ADMINISTREJO: Vl. Kočvara, OSTRAVA 8, Kameneč
251/31 Ĉeĥoslovakio.

Ĉi n-ron ILUSTRIS: Inĝ. ark.M.Kalný.